

EKO 2025

Mesaĝe,
kuraĝe

EKO 2025-16. Aprilo 15. Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Sen alkroĉaĵo: Sume 300 KB

AMO-seminario disvolviĝos en Brno

En la 29-a de julio kadre de la 110-a UK okazos la *Tago de Lernado*. Tiu evento portos la temon: **Pri la uzo de Esperanto kaj teknologio por pacaj celoj**. Temos pri hibrida evento. La programo kaj la Zoom-ligilo estos diskonigitaj antaŭ la komenco de la UK.

Marija Belošević, kunordiganto de la Tago de Lernado.

Eo-kursoj 60-jariĝis en Brazilia Universitato

Junie la Esperanto-kurso de la Universitato-UFC, en Fortalezo, Brazilo, fariĝos 60-jara. Ĉe la placo *Gentilândia Benfica*, kie staras busto de Zamenhof, Esperanto havis kulturdomon kun vizitoĉambro, sekretario, 3 lernoĉambroj kaj manĝejo, kiu bedaŭrinde post pli ol 30 jaroj nuntempe apartenas al sindikato de la universitato.

Paulo Amorim Cardoso estis la kunordiganto kaj ĉefa profesoro de la kulturdomo de 1965 ĝis li emeritiĝis en 1991. Paulo estis fervora movadano, kiu partoprenis plurajn Esperanto-aranĝojn kaj ĉiam instigis siajn kursanojn praktiki la lingvon kaj aliĝi al la Esperanto-movado. En 1981 li preparis karavanon kaj veturigis ĉ. 40 esperantistojn el Cearao al kunveno en Braziljo. La nuna profesoro Adelson A. A. Sobrinho en 1981 trapasis konkurson por instrui Esperanton tie. Kredeble, UFC estas la sola universitato en la Brazilo, kie du homoj trapasis konkurson por instrui la lingvon internacian.

Mia propono estas ke ni, kursgvidantoj de Esperanto, sendu al la Eo-kursoj de UFC salutmesaĝojn gratulante ilin pro la 60-jariĝo. Ĝi povas esti en Esperanto kaj en via lingvo. Bonvolu sendi vian mesaĝon al la kunordiganto: Prof. Jimmy Robson Rodrigues da Costa - culturaestrangeira@ufc.br kun kopio al Prof. Adelson A. Alves Sobrinho - nosleda2k20@gmail.com aŭ sendi leteron/poŝtkarton al la poŝtadreso: Coordenação Geral das Casas de Cultura Estrangeira - UFC - Cursos de Esperanto - Avenida da Universidade, 2683 – Benfica - Fortaleza CE– BR-60020-181

Aristóphio A. Alves Filho

Burundo facile atingebla

Jen nova kaj interesa artikolo, kiu aperis en la retejo <uea.facila>: pri 'Esperantistino premiita en Burundo' (pri kio EKO-komuniko jam raportis):

<https://uea.facila.org/artikoloj/homoj/esperantistino-premiita-en-burundo-r470/>

Radia servo el Italio

La stabo de EsperRadio invitas ĉiun festi la radion kaj sekvi nin dum la diversaj programoj en *facebook* kaj *youtube* kaj aboni niajn kanalojn

<https://youtu.be/Qt5tMeypFg0>



Unu el la plej elstaraj samboj de **Chico Buarque** gajnis videon: [Turniço](#). Ĝia originala titolo estas *Roda viva*, kaj la bonegan tradukon faris **Jorge de Oliveira**:

Rekono por la Eo-vikipediistoj

Esperanto kaj Libera Scio, la ununura Esperantlingva organizo plene dediĉita al subteno de Vikipedio kaj ĝiaj gefrataj projektoj, ĵus ricevis gravan rekonon de la Wikimedia Foundation - aljuĝon de statuso de Tema organizo (io simila al Faka Asocio de UEA) 🎉

Danke al tio malfermiĝis al ni la pordo por ricevi subvencion por tutjara laborado, pagataj oficistoj kaj eĉ oficejo. Mi ekstraktis kun UEA pri eblo lui parton de la Centra Oficejo.

SMG: Mi ege aprobas la ideon uzi la Centran Oficejon! Mia hejmo tra deko da jaroj (1976-86). Pro merkataj kondiĉoj, ne forvendinda, do TEJO uzu ĝin!

Kubo F

Verda balono el Brazilo

Jen porinfana priesperanta kanto, nome *La verda balono*, traduko farita de **Vitor Mendes** el la portugallingva *Superfantástico*. Tiu ĉi kanto furoris antaŭ kelkaj jaroj per la voĉoj de la bando **A Turma do Balão Mágico**.

Israela kongreso

Dimanĉe finiĝis la 25-a Israela Kongreso, kun abunda programo kaj tre agrabla etoso. Estis pli ol dudek partoprenantoj, tri eksterlandaj esperantistoj (el ili du Bahai-gastoj), kiuj ĝuis modernan kaj komfortan kongresejon kun bela pejzaĝo (la junulargastejo de Peki'in), interesajn ekskursojn kaj riĉan programon. Kiel kutime, dumtage okazis ekskursoj, posttagmeze kleriga programo, kaj vespere arta kaj socia programoj, videbla en la kongresa retejo <https://esperanto.org/il/ik25.html>). La komunikadon faciligis Vacapo-grupo kreita de Nava, kiu ebligis tujan dividon de informoj kaj fotoj inter ĉiuj kongresanoj.

Westerhof, sekretario de Bahaa E-Ligo (BEL), mallonge prezentis la agadon de BEL okaze de ĝia 50-jara jubileo. Jehoŝua prelegis pri la sciencfikcia branĉo de alternativa realeco. Fine, en la kutima ferma forumo, Amri projekciis fotojn de la kongreso kaj la partoprenantoj rakontis pri siaj kongresaj spertoj, ĝenerale tre pozitivaj.

Fotoj pri la kongreso videblas en

<https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10236311931608350> kaj <https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10236324022990627> .

Lunde okazis postkongresa ekskurso, al la Bahai-ĝardenoj en Haifa. Post longa vizito de la mirinde belaj ĝardenoj okazis akcepto kaj vizito de la Bahai-templo. La grupo estis gvidata de la Esperanto-parolanta Bahaa ĉiĉerono Gyöngyi. Sekvis ekskurso al Akko, kie oni vidis la Kavalirajn Kelojn (subtera urbo de la kruckavalira epoko), la grandan moskeon, la bazaron kaj plurajn aliajn turismaĵojn. Fotoj pri la Postkongreso videblas en <https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10236365122938100>.

Ni vizitis la Malnovan Urbon, la Judan Kvartalon kaj la Okcidentan Muron, Via Dolorosa kaj la Preĝejon de la Sankta Tombo, la Armenan Muzeon kaj la Urbon de Davido.

Amri Wandel

Litovio, Nederlando kaj Pollando en kombino

Paweł Fischer-Kotowski, pola esperantisto loĝanta en Nederlando, redaktos la ĉiutagan gazeton de la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Legu pli en *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2025/04/bet-186/>

Zaozhuang filmite

Jen intervjuo kun juna ĉina filmistino, kiu filmis la Esperanto-Muzeon en la Universitato de Zaozhuang. esperanto.cri.cn/2025/04/10/ARTI1744249321862957

Alessandra Madella

Lingvistoj servataj

Ipl - kaj ĝia anglalingva versio, Ifl - estas eldonataj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Niaj novaĵletoj disponigas informojn kaj ĝisdatigojn pri interlingvistiko kaj lingvoplanado, kun detaloj pri eventoj kaj novaj publikaĵoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj, kaj aliajn utilajn informojn por esploristoj kaj ĉiu, kiu interesiĝas pri lingvopolitiko, Esperantologio kaj rilataj temoj.

ipi@interlingvistiko.net

Universitatanoj kunpensas

Jen la registraĵo de la 59-a sesio de la Kunpens(ig)adoj, kiu unuafoje okazis kun gvidado de d-ino Alessandra Madella, post la bedaŭrinda perdo de la kara prof. Renato Corsetti: <https://youtu.be/pSqvKrQM3uY>

Registraĵoj de antaŭaj sesioj, gviditaj de Renato estas spekteblaj ĉe:

<https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CMqTrpXMay2YVfrhDYT-Vm5>

Ahmad Mamduhi, prezidanto de ILEI

Birute en BET

Birutė Prekevičiūtė, litova aktorino kaj artpedagogino, prezentos sian spektaklon pri Barbora Radvilaitė en la arta programo de BET-59, kiu okazos en la 5-a ĝis la 13-a de julio 2025 en Kaŭno. Legu pli pri ŝi kaj pri ŝia spektaklo en *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2025/04/bet-187/>.

Telegramme elekt-ame

La Telegram-kanalo "Esperanto-novaĵoj" (https://t.me/esperanto_news), fondita en julio 2023, nun estas la plej populara Telegram-kanalo en Esperanto kun 585 abonantoj.

Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2025/04/telegramo-3/>

Aŭtuna foliaro tamen floras

Pri la projekto "*Poezio, kiu kunligas*" – *Aŭtuna foliaro* de Julio Baghy – mi informas vin, ke ĝis nun 33 tradukoj en 25 lingvoj estas ricevataj. La lingvoj estas la jenaj: albana, angla, bulgara, ĉeĥa, ĉina (2), franca, germana (2), greka, hispana, hungara (2), irlanda, itala (2), japana (2), korea, kroata, litova, malta, pola, portugala (2), rusa, serba (2), slovena (2), svahila, turka, ukraina. Mi ricevis informojn, ke la traduko en la sveda bone progresas, kaj ke ekzistas intencoj traduki la poemon al la rumana, latva kaj finna lingvoj, eble ankaŭ al la estona. Mi ligas grandajn esperojn al la armena, bangla, hinda, nederlanda, persa, urdua kaj vjetnama lingvoj – mi ankoraŭ atendas novaĵojn pri la stato de la tradukado en tiuj lingvoj.

István Szabolcs, Hungario

**Juna amiko – vera amiko! Aboninda!
Ene, vi trovas tion!**

interkultura

m



nd



===== vortoj: 1115 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikaĵoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komunikaĵo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikaĵoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

Dek numeroj de 2025 aperis, kune kun kvardek kvar numeroj de 2024

ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikaĵojn pere de retlisto.